

TURNOPUNKTO POR ĈIUJ NACIOJ

**Resumo de la deklaro de Bahaa Internacia Komunumo
okaze de la 50a datreveno de la fondiĝo de la Unuiĝintaj Nacioj**

Oktobro 1995

La homaro fine de la 20a jarcento troviĝas en kurioza situacio: La kolapso de normoj, tradicioj kaj institucioj akre kontrastiĝas kontraŭ nova pensado, kiu rekonas la reciprokan dependecon de la nacioj kaj popoloj kaj el tio konkludas konceptojn por nova, komuna ordo sur nia planedo.

Antaŭ tia fono multaj bonvenigas la 50an datrevenon de la fondiĝo de la Unuiĝintaj Nacioj kiel konvenan okazon por fari proponojn por la pluevoluigo de la Unuiĝintaj Nacioj. En sia tiurilata ampleksa dokumento la Bahaa Internacia Komunumo – kiel NeRegistara Organizaĵo kun konsila statuso akreditita ĉe la Unuiĝintaj Nacioj – opinias ke plej urĝe la Unuiĝintaj Nacioj bezonas pli ampleksajn responson kaj suverenecon ol ĝis nun. Samtempe ankaŭ estas esprimita ke la rajtoj kaj evoluopotencialoj de la unuopaj homoj estas nepre protektendaj kaj prosperigendaj. La konkretaj proponoj de Bahaa Internacia Komunumo koncernas – en tre resumita formo – la sekvajn sferojn:

I. Novorientiĝo de la Unuiĝintaj Nacioj

A. Novaj taskoj por la Ĝenerala Asembleo

Longperspektive la popoloj de la mondo estu pli efike kaj pli demokrate reprezentataj kaj per iom-post-ioma reduktado de la unuopŝtata suvereneco akiru la decidoj de la Ĝenerala Asembleo pli kaj pli ligan karakteron – precipe koncerne aferojn kiuj esencas por la homara destino.

Kurtperspektive povus la efektivigo de la sekvaj proponoj kontribui al fortigo de la reputacio kaj la influo de la Ĝenerala Asembleo kaj preparus la ŝtatanaron por la realigo de la longperspektivaj celoj:

1. Membroŝtatoj estu devigataj al ĝeneralaj, liberaj kaj regulaj balotoj. La UN-membreco dependu de tiu ĉi minimuma demokrata normo.
2. Nesolvitaj problemoj inter membroŝtatoj pri landlimoj estu zorge ekzamenataj de internacia komisiono kaj fine lige decidataj.
3. Pere de efikaj agoj, proponendaj de internacia eksperta teamo, la financado de la Unuiĝintaj Nacioj estu sekurigata.
4. Aldone al la loka kaj nacia lingvo aŭ lingvoj en la lernejoj tra la mondo estu instruata komuna universala helpa lingvo. Estu nomumata altranga internacia komisiono por funde ekzameni la lingvon elektendan.
5. Altranga komisiono senprokraste esploru la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la enkonduko de unusola tutmonda valuto.

B. Evoluigo de vera Ekzekutivo

Por venki la aktualan politikan malfortecon de la Unuiĝintaj Nacioj, nome ĝian mankantan ekzekutivan funkciadon, estas farataj la sekvaj proponoj:

1. La vetoa rajto de la konstantaj membroj de la UN Sekureca Konsilio estu limigata.
2. Estu fondata konstanta internacia armeo sendependa de la unuopaj membroŝtatoj.
3. La principo de kolektiva sekureco ankaŭ ekster la pure militarisma sfero estu aplikata tie, kie la homaro estas globale endanĝerigata.
4. La ekzekutiva funkcio de la UN-Helporganizaĵoj estu pliampleksigata.

C. Fortikigo de la Internacia Tribunalo

La verdiktoj de la Internacia Tribunalo devus akiri daŭran kaj devigan karakteron por la membroŝtatoj. Ankaŭ eblus plivastigi ĝian aŭtoritaton, kiu aktuale limiĝas je konfliktoj inter la membroŝtatoj, je ankaŭ aferoj de aliaj UN-instancoj. Krome estu kreataj specifaj kortumoj kaj juĝejoj por procesi kaj

verdikti kontraŭ severaj internaciaj deliktoj kaj krimoj, ekz. sur la terenoj ekologia, terorisma kaj drogkomerca.

II. La potencialo de la unuopulo – ĝia protektado kaj ĝia prosperigado

La plej alta celo de ŝtata agado – kaj tiel ankaŭ de la Unuiĝintaj Nacioj en la sfero superŝtata – estas la socia kaj kultura evoluigo. Tiaj klopodoj povas internacie sukcesi nur se krom struktura plibonigo de la Unuiĝintaj Nacioj ankaŭ estas observata la protektado kaj prosperigado de la potencialo de la unuopulo, tiel ke ekestas sin reciproke fekundiĝanta procezo. Tiurilate estas proponata:

A. Ekonomia evoluigo havu vastecan aliron

Ekonomia evoluigo, kiu daŭre devas esti tutmonde akcelata, bezonas vastecan aliron, kiu ampleksas edukadon kaj instruadon kaj kiu certigas krom la akumulado de profito ankaŭ ties justan distribuadon. Krome la konscio pri la ĝusta traktado de niaj komunaj resursoj kaj materiaj rimedoj devas esti flegata. Grava tiurilata instrumento estas la "Agendo 21", kiu konsekvence estu tutmonde efektivigata.

B. La observado de la homaj rajtoj estu pli severe kontrolata

Homaj rajtoj havas universalan karakteron. Ne eblas ilin limigi aŭ malobservi pro kulturaj, religiaj aŭ politikaj starpunktoj. Por praktike firmigi tiun ĉi fundamentan postulon estu la observado de homaj rajtoj pli severe kontrolata kaj la ratifikado de internaciaj homrajtaj konvencioj fare de ĉiuj membroŝtatoj akcelata. Eblus eksigi de la Komisiono pri Homaj Rajtoj membroŝtatojn en kiuj evidente kaj konstante atencoj kontraŭ la homaj rajtoj estas de la ŝtato mem tolerataj aŭ eĉ multigataj.

C. La statuso de virinoj estu akcelata

La statuso de la virinoj bezonas pli efikan akceladon. Ilia reprezentiĝo en gravaj instancoj kaj gremioj estu certigata. Diskriminado kaj perfortado de virinoj definitive devas esti eksterminataj. La familio devas esti rekonata kiel la fundamento de la socio. En la nuna stadio de la socia evoluado havu virinoj kaj knabinoj la prioritaton je edukado kaj lernado. La principo de la egalrajteco kaj komplementeco de la seksoj pli klare estu rekonata. Al tio ĉi kontribuu la sekvaj praktikaj paŝoj:

1. Pli da virinoj ol ĝis nun anu en internaciaj delegacioj kaj okupu diplomatajn postenojn.
2. La ratifikado de internaciaj konvencioj por la protektado de virinaj rajtoj kaj ties efektivigo estu akcelata de ĉiu membroŝtatoj.
3. La efektivigo de la decidoj de la Kvara Monda Virina Konferenco en Pekino estu konsekvence observata.

D. Morala edukado estu emfazata

Morala edukado estu pli klare emfazata. Malgraŭ diversaj kulturaj fonoj la homaro posedas trezoron de bazaj valoroj, kiu estas komuna al ĉiuj religioj kaj tradicioj. El ĝia vasta instruado signife profitos kaj la individuoj kaj la sociaj komunumoj.

La Bahaa Internacia Komunumo apelacias al la regantoj tra la tuta mondo konsciiĝi pri sia specifa kaj elstara responso kaj fari tiujn decidojn, kiuj estas esence necesaj por la transvivo kaj la prospero de la homaro.

*Via perspektivo estu mondampleksa, ne limigita je via propra memo...
Ne okupiĝu vi pri viaj propraj aferoj; viaj klopodoj fiksiĝu je tio kio reestablos
la bonfarton de la homaro kaj sanktigos la korojn kaj animojn de la homoj.*

Bahá'u'lláh

La kompleta deklaro *Turning Point for all Nations*
haveblas ĉe la bahaaj Naciaj Spiritaj Asembleoj aŭ ĉe:
Bahá'í International Community, 866 United Nations Plaza, Suite 120, New York,
NY 10017-1822, Usono; T +1-212-803-2500, F +1-212-803-2566,
bic-nyc@bic.org, <https://www.bahai.org>

Pliaj informoj ankaŭ haveblas ĉe:
Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)
Eppsteiner Str. 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain, Germanio
T +49-(0)6192-9929-16, F +49-(0)6192-9929-99
bel@bahai.de, <https://bel.bahai.de>